# TEA-BULTENO

4ª JARO — JANUARO 2001 — NUMERO 1

## AGENDO

| | | |
|---|---|---|
| 1 | L | **01-01-2001** |
| 2 | M | Ordigo de TEA-arkivo |
| 3 | M | |
| 4 | Ĵ | |
| 5 | V | Aŭstralio: proze kaj kante |
| **6** | **S** | |
| **7** | **D** | |
| 8 | L | |
| 9 | M | Ordigo de hemeroteko |
| 10 | M | |
| 11 | Ĵ | |
| 12 | V | Januaruloj festas! |
| 13 | S | |
| **14** | **D** | **Jara Asembleo de TEA** |
| 15 | L | |
| 16 | M | Ordigo de TEA-arkivo |
| 17 | M | |
| 18 | Ĵ | |
| 19 | V | Kartludado |
| 20 | S | |
| **21** | **D** | |
| 22 | L | |
| 23 | M | Ordigo de TEA-arkivo |
| 24 | M | |
| 25 | Ĵ | |
| 26 | V | Pri **Triesto 2001** |
| 27 | S | |
| **28** | **D** | |
| 29 | L | |
| 30 | M | Ordigo de TEA-arkivo |
| 31 | M | |

## Bonan Novan Jaron!

2001 - Magia cifero: komenciĝas nova jarcento kaj nova jarmilo! Ĉu tio influos niajn vivojn, niajn kondutojn, niajn esperojn? Ĉu ĉi tiu transsalto al nova jarmilo igos, ke okazu revolucia transformiĝo en ĉiu kampo de la homa sfero? Certe ke ne. Ni irados, vole-nevole, laŭ la sama antaŭa vojo kaj baraktos inter miloj da problemoj, klopodante ripari la malbonaĵojn faritajn en la pasintaj jardekoj kontraŭ medio kaj kontraŭ la homoj mem, aŭ - tutsimple - daŭrigante blinde kaj obtuze damaĝi kaj detrui ĉion kio restas el nia planedo kaj ties loĝantaro.

Pli kaj pli oni konscias, ke - kvankam bedaŭrinde jam malfrue - oni tamen devas insiste strebi al konservado kaj defendo de oniaj havaĵoj - materiaj kaj, grave!, spiritaj - sed plej ofte unuopaj aŭ grupaj agadoj disperdiĝas pro la forta povo de tiuj kiuj desupre, lerte kaj ruze, manovras por atingi siajn celojn kiuj tute ne koincidas kun la bezonoj kaj deziroj de tutmondaj popoloj.

Tamen ĉi tiuj konsideroj ne estu instigo al nenifarado kaj pasiva, inerta rigardado de la eventoj, pretekste, ke "ja, bone, jam aliaj iel ion faras" aŭ "mia voĉo en ĉi ŝtormo estas tro mallaŭta", sed kontraŭe, ili stimulu al kontraŭstaro kaj kontraŭago, al engaĝiĝo en ĉio kio povas plibonigi la ĉieajn cirkonstancojn, situaciojn aŭ kondiĉojn, ankaŭ por demonstri ke la veraj homaj valoroj havas nuntempe eĉ plian pravon ekzistadi, por savi tion ankoraŭ saveblan kaj por redoni mondon pli digne vivindan al ĉiuj, ĉefe al estontaj generacioj.

## Ek al la 2001ª Jaro!

Kaj kion faros **TRIESTA E-ASOCIO** en la nova jaro? Certe vi ĉiuj jam konas la respondon: energie kaj entuziasme oni daŭrigos la laborojn por la organizado de la

### 70ª Itala Kongreso de Esperanto
### Trieste, 28 julio - 1 aŭgusto 2001

Tiu ĉi estas la plej granda kaj peza tasko, kiu atendas nin kaj kiun ni devas plenumi kiel eble plej sukcese: do, ni bezonas vian helpon, vian kunlaboron, vian ĉeeston, por ke ĉi tiu grava manifestacio restu memorinda ne nur por la samideanaro, sed precipe por la triestanaro.

Tio, kion ni rikoltos post la kongreso inter nia urbanaro, estu la ĉefa rezulto-celo: niaj klopodoj direktiĝu al intensa informado pri Esperanto en nia urbo, por sukcesi restarigi nombre vizitatajn kursojn, por akiri novajn membrojn, novajn homfortojn, por ke Esperanto ne plu estu nekonata vorto, por ke ties celoj estu bone komprenataj de ĉiuj kaj fine, oni konsciiĝu ke nia propono estas solvo inteligenta kaj ekologia por senpera, mondskala lingva komunikado.

## La angla en la reto

"*La kreskanta kvanto da retuzantoj en Latinameriko kaj Azio faros ke, antaŭ la fino de la tri venontaj jaroj, la angla lingvo ne plu restu kiel superreganta idiomo en la interreto*" - tio laŭ esploroj efektivigitaj de la firmao COMPUTER ECONOMICS. Krome "*tiu superregado daŭre falos ĝis la jaro 2005, kiam ses el ĉiu deko da internaŭtoj parolos alian lingvon escepte de la angla.*"

"*La kreskado de Interreto en landoj, kie oni ne parolas la anglan, postulos, ke entreprenoj ofertu en siaj hejmopaĝoj plurajn elekteblajn idiomojn*" diris Michael Erbschloe, vicprezidanto de la esplorfako de COMPUTER ECONOMICS.

Dum la venontaj 6 jaroj, la nombro da uzantoj de la angla lingvo en la interreto pligrandiĝos je 60%. Aliflanke, la klientaro, konsistanta el tiuj kiuj ne parolas la anglan, dum la sama periodo kreskos je 150%. Ĝis tiam, la sumo de internaŭtoj en la tuta mondo estos 345 milionoj da homoj.

*Luiz Fernando Vencio - lvencio@radiologist.net*
*(Fonto: Ret-Info)*

## Kien egalrajteco?

Ekde kelkaj semajnoj la COUNCIL OF EUROPEAN MUNICIPALITIES AND REGIONS (CCRE) serĉas DENASKAN anglaparolanton, kiu respondecu pri informado ĉe koncerna CCRE-oficejo en Bruselo (rue d'Arlon, 22).

En la anonco de semajngazeto BULLETIN, estas klare skribite, ke tiu instanco (http://www.ccre.org) serĉas ĝuste **denaskan** anglaparolanton. Kaj substrekindas, ke temas pri eŭropa organizaĵo! Por plenumi taskon (ĉi-kaze informadon) por eŭropa organizaĵo, ne nepras ke respondeculo DENASKE parolu la anglan!


Saĝe, la plejparto de eŭropaj organizaĵoj serĉas homojn kiuj, "perfekte", "flue" aŭ eĉ nur "tre bone", parolas la anglan. Malsaĝe, CCRE publike skribas, ke ĝi serĉas NUR desnaskan anglaparolanton. Tiel ĝi donas klaran ekzemplon de lingva malegaleco kiun bona juristo povas uzi kontraŭ la organizaĵo. Bedaŭrinde neniu neregistara organizaĵo en Bruselo agos kaj baldaŭ COUNCIL OF EUROPEAN MUNICIPALITIES AND REGIONS havos sian denaskan anglaparolanton.

Kion diras eksa prezidento de Francio kaj nuna prezidanto de CCRE Valéry Giscard d'Estaing pri lingva diskriminacio?

*Inf: Dafydd ap Fergus <dafyddapfergus@yahoo.com>*

La supra informo mem (ne la rekta distribuado) estas bone uzebla en PR-laboro de Esperanto-organizaĵoj: ja per tio oni povas atentigi la legantojn de iuj ĵurnaloj aŭ respondeculojn de naciaj (ne-esperantistaj) organizoj pri la malvaloriĝo de ilia scio de la angla. Ekz: "Fremduloj vane lernas la anglan, la denaskuloj estas pli valoraj..."

L. Szilvási *(fonto: ret-info)*



## KORESPONDI DEZIRAS AMIKO EL TAĜIKISTANO

Saluton! Mi estas Zohit el Taĝikistano. Mi volas korespondi kun vi. Mi estas 20-jara fraŭlo kaj studas en universitato en la 3ª kurso. Mi loĝas en la Taĝikistana ĉefurbo Duŝanbe. Mi deziras al vi ĉion plej bonan. Bonvolu skribi al mi. Via amiko

Mullomalikov Zoir <mzoir@cada.tajik.net>

# Ordinara Jara Asembleo de TEA

La Ĝenerala Asembleo de la membroj de TEA okazos dimanĉe la **14ªⁿ de januaro 2000 je la horo 9.30 en unua kunvoko kaj respektive je la 10ª en dua kunvoko**. Ĉi lasta validos kun kiu ajn nombro de partoprenantoj.

## TAGORDO

1. Elekto de la prezidanto kaj sekretario de la Asembleo.
2. Legado kaj aprobo de la protokolo de la antaŭa jarkunveno.
3. Raportoj pri la agado dum la jaro 2000.
   a) Morala raporto de la prezidanto *(E. Ackermann)*
   b) Agadraporto de la sekretario *(E. Doerfler)*
   c) Financa kaj bilanca raporto de la kasisto *(G.Valle)*
   ĉ) Deklaracio de la revizoroj *(A. Zerpini - E. Nocent)*
   d) Raporto de la triesta katedro *(E. Doerfler)*
   e) Raporto pri la libro-fako *(G. Valle)*
4. Elekto de la balot-komisiono.
5. Voĉdonado por la elekto de estraranoj kaj revizoroj.
6. Diversaĵoj (pritraktotaj dum kontrolo de la balotiloj).
7. Anonco de la rezultoj de la voĉdonado.

## DELEGILO

La asociano ____________________

estas delegita anstataŭi min ĉe la Jara Asembleo de TEA, okazonta dimanĉon la 14ªⁿ de januaro 2001.

Subskribo ____________________

Dato ____________________

---

Pro la organizado de la Itala Kongreso en nia urbo kaj pro la ĝis nun nesolvita sideja problemo, la ĉi-jara Asembleo havas apartan gravecon kaj tial nepras, ke ĉiu ano de **TEA** ĝin ĉeestu. Se vi deziras, kiel la estraro, ke la Kongreso elstare sukcesu kaj ke **TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO** havu brilan estontecon kaj ... novan kunsidejon, nu, certe ankaŭ **VI** estos inter kaj kun ni.

Dum la asembleo, oni disdonos kvarpaĝan foliaron pri la

**STRATEGIA LABOR-PIANO DE UEA - 2001/2010**
**AL LINGVA DEMOKRATIO**

pri kiu okazos diskutoj dum iu februara vendredo.

Krome la kasisto, tre volonte, estos je via dispono por pago de TEA-, FEI aŭ/kaj UEA-kotizoj, abonoj al revuoj, ĵurnaloj ks, aliĝkotizo al la Itala Kongreso ktp ktp.

BULTENO de la membroj de
TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
**Sidejo**: Via Crispi 43 - 34125 Trieste
tel/fakso: +39 040 763128
Reto: esperanto@retecivica.trieste.it; nored@tiscalinet.it
**Poŝta adreso**: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro-Italio
Poŝtĉekkonto N° 10834349